

Esperanto por UN

Informilo de la oficejo de Universala Esperanto-Asocio por rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj

Numero 59, julio-aŭgusto 2022



Universala Esperanto-Asocio



Universala Esperanto-Asocio emfazas lingvan kaj kulturan diversecon kaj invitas esperantistojn al sia kongreso en Montrealo, 6-13 aŭgusto

“Multlingvismo estas vojo por protekti kaj konservi la diversecon de lingvoj kaj kulturoj,” laŭ la mesaĝo de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Monda Tago por Kultura Diverseco, la 21-an de majo. La mesaĝo aparte emfazis la neceson protekti kulturojn kaj lingvojn tra la mondo, substrekante la fakton, ke la jaro 2022 estas la unua jaro de la Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj, proklamita de UN kaj Unesko.

La Jardeko konsistigos la ĉeftemon de la ĉi-jara Universala Kongreso de Esperanto, okazonta en Montrealo, Kanado de 6 ĝis 13 aŭgusto. La kongreso kunvenos en la Universitato de Kebekio-Montrealo. Laŭ lastatempa gazetara komunikado, “Oni atendas preskaŭ mil partoprenantojn. Pere de la Universala Kongreso de Esperanto, Montrealo bonvenigos delegitojn el dekoj da landoj tra la mondo, kiuj komunikigos per neŭtrala lingvo celanta respekton de lingva kaj kultura diverseco. Esperanto estas planlingvo por internacia komunikado, unue publikigita de L. L. Zamenhof, naskiĝinta en la nuntempa Pollando en la jaro 1887. Montrealo havos la honoron bonvenigi Margaret Zaleski-Zamenhof, pranepino de L. L. Zamenhof, kiu flue parolas Esperanton kaj oficiale reprezentos la familion Zamenhof.

“La ĉeesto de tiel multaj parolantoj de Esperanto en Montrealo estos okazo por ke la enloĝantoj de Montrealo eltrovu la internacian, malferman – sed ofte neatentatan – kulturon, kiun Esperanto nutras tra pli ol 130 jaroj per sia muziko, libroj, revuoj, kaj pli. Kursoj por komencantoj estos proponataj antaŭ la kongreso por tiuj kiuj volas plibonigi sian scion de Esperanto antaŭ partopreno en la kongreso.

“La Universala Kongreso de Esperanto jam ricevis subtenon de pluraj lokaj personecoj: ĵurnalisto kaj aŭtoro Jean-Benoit Nadeau, la historiisto Georges Sioui, fondinto de la Festivalo de Unuaj Popoloj André Dudemaine, muzikisto Yves Desrosiers (kiu publikigis programon en Esperanto en 2020), filmisto Matthew Rankin, aŭtoro Claudia Larochelle, kantisto Bïa kaj artisto Chlag.”

Reprezentanto de UEA memorigas la Forumon WSIS: Fundamenta al homa komunikado estas la lingvo; fundamenta al manko de komunikado estas lingva diferenco

Parolante neĉeeste dum la fina semajno de la Forumo WSIS (WSIS: World Summit on the Information Society: Monda Pintkonferenco pri la Informada Socio) en Ĝenevo, la reprezentanto de Universala Esperanto-Asocio apud UN, Humphrey Tonkin, emfazis, ke lingva malsameco estas fundamenta demando se temas pri la bezonoj de la hodiaŭa informada socio, kaj ke informada teknologio fokusiĝu al la tasko igi la voĉojn de la mondo kompreneblaj al la politikofarantoj.

“Dum ni sidas ĉi tie en nia internacia rondo,” d-ro Tonkin rimarkigis, “estas facile imagi ke ni jam esence solvis la problemon de lingva diverseco. Ni uzas la anglan, aŭ ni estas helpataj de lertaj interpretistoj kaj tradukistoj kaj de la komunikaj teknologioj kiujn ili havas je sia dispono. Ni sentas, ke ni povas konversacii kun la mondo. Sed verdire ni povas *paroli* al la mondo, sed la plejparto de civila socio ne kapablas *aŭdi* nin: ni kreis hierarkion de lingvoj, levante kelkajn kaj flankigante aliajn.”

“Daŭripova evoluigo devas inkluzivi la flankigitajn, devas inkluzivi reciprokecon,” li aldonis.

Kvankam laŭdante Unuiĝintajn Naciojn pro ties klopodoj antaŭenigi multlingvismon, d-ro Tonkin atentigis, ke politikofarantoj daŭre dediĉas malmultan atenton al lingvaj diferencoj: “La civila socio parolas multajn lingvojn kaj ofte povas nek kontribui al la internacia debato nek kontraŭ respondi.”

La sesio en kiu d-ro Tonkin estis podiskutanto estis organizita de CoNGO, la Konferenco de Neregistaraj Organizaĵoj en Konsulta Rilato kun Unuiĝintaj Nacioj.

Komitato pri Lingvoj estos prezidata de reprezentanto de UEA

Oni starigis en Novjorko Komitaton de Neregistaraj Organizaĵoj pri Lingvoj sub aŭspicio de CoNGO, la Konferenco de Neregistaraj Organizaĵoj en Konsulta Rilato kun Unuiĝintaj Nacioj. Entute 23 NROj aliĝis kiel fondaj membroj. La komitato celas doni pli grandan atenton al lingvaj demandoj en la politiko, praktiko kaj eksteraj rilatoj de UN, precipe en rilato al la ĝenerala graveco de demandoj pri lingvoj, lingva justeco kaj lingva nediskriminacio.

La reguloj de la nova komitato estis aprobitaj en kunsido la 18-an de majo kaj oni elektis estraron. La multnombre ĉeestata kunveno enhavis prezenton de funkciuloj de Unesko pri ties lingvorilataj programoj, precipe multlingva edukado, la Internacia Jardeko de Inidiĝenaj Lingvoj, kaj la nova Monda Atlaso de Lingvoj.

Francis M. Hult kaj Humphrey Tonkin, reprezentantoj de Universala Esperanto-Asocio apud UN, estis elektitaj kiel respektive prezidanto kaj vicprezidanto. Francis Hult estas Profesoro pri Edukado ĉe University of Maryland Baltimore County (UMBC), kaj Humphrey Tonkin estas Emerita Prezidanto de la Universitato de Hartford.

Elektita kiel sekretario estis Linda Fitchett, iama prezidanto de la Internacia Asocio de Konferencaj Interpretistoj. Hans E. Becklin, de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) elektiĝis kiel kasisto. Daniel LeBlanc, de VIVAT Internacia, kaj Allison Rodriguez, de la Internacia Federacio de Tradukistoj (FIT), estis elektitaj kiel kromaj estraranoj.

La Esperanto-movado laboras por la natura medio multflanke

La 5-a de junio estis Monda Naturmedia Tago, observata en la Esperanto-movado de multaj organizoj kaj grupoj, inkluzive de Universala Esperanto-Asocio. “Antaŭ 50 jaroj, en 1972,” deklaris la ĉi-jara mesaĝo de UEA okaze de la Tago, “la internacia politiko pri medio sukcesis atingi solidan kolektivon direktan pro la okazigo de la Konferenco pri la Homa Medio (la Konferenco de Stokholmo), post kiu en tiu sama jaro, la 15-an de decembro, la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj adoptis la rezolucion A/RES/2994 (XXVII) deklarantan la 5-an de junio la Monda Tago de la Medio (MTM). La rezolucio instigas registarojn kaj organizojn entrepreni en tiu tago, ĉiujare, tutmondajn agadojn reasertantajn la zorgon pri la konservado kaj plibonigo de la medio, cele al profundigo de la ekologia konscio en la menso de la homoj.”

UEA plue mesaĝis: “Tiu tago devas utili por reliefigi, ke protektado, sano, resanigo kaj daŭripoviga flegado de la medio estas grava afero por la garantio de la diverseco en nia planedo kaj por la rekta influo al la bonfarto de la popoloj kaj al la ekonomia disvolviĝo en la tuta mondo. Ĝi donas al ĉiuj ni okazon eduki kaj edukiĝi per kleriĝo pri la temo kaj alvoki individuojn kaj grupojn al respondeca komuna konduto por konservado kaj refortigo de la naturo en nia planedo.”

La mesaĝo atentigis pri aperigo de esperantlingva gvidilo pri la 17 Celoj por Daŭripova Evoluigo kaj la starigo, flanke de esperantistoj, de la Klimata Fondaĵo. Ĝi aludis al la laboro de la Asocio de Verduloj Esperantistaj kaj al la kampanjo Tutmonda Arbo-Plantado. En la nuna jaro tiu kampanjo proksime kunlaboras kun ATE, la Asocio de Terkultivistoj Esperantistaj, pri programo por plantigo de fruktarboj en Benino. Ĝis nun, oni plantis 700 arbojn.

Esperanto-Tago 2022

Parolantoj de Esperanto tra la mondo partoprenos festadon de la Esperanto-Tago la 26-an de julio. La tago markas la daton de la unua eldonaĵo pri Esperanto, aperigita en Varsovio de d-ro L. L. Zamenhof la 26-an de julio 1887. La broŝuro, kiu poste aperis en pluraj lingvoj, lanĉis la Esperanto-movadon.

Tiu dato estas okazo kiam lokaj kaj landaj Esperanto-organizoj festas la lingvon kaj kulturon de Esperanto, aĉetas Esperanto-librojn, piknikas en parkoj kun lokaj esperantistoj, lanĉas projektojn por plibonigi la lokan komunumon, diskutas pri Esperanto en sociaj medioj, montras subtenon por rifuĝintoj kaj aliaj dislokitaĵoj, kaj faras amason da aliaj utilaj agadoj.

Oficejo por rilatoj kun UN, Universala Esperanto Asocio, 777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.
[1] 212-687-7041. www.esperantoporun.org.